Do, al enciklopedioj! En VEBE ni trovas, ekzemple, artikolon de universitata (St. Peterburgo) profesoro S. Buliĉ[4] „Tutmonda aŭ Internacia Lingvo" (Buliĉ, 1892), en kiu la aŭtoro faras provon analizi la problemaron deklaritan en la titolo. Kiel observas interlingvistoj (Kuznecov, 1987), en ĉi tiu tempo la menciitajn du vortojn oni uzis preskaŭ sinonime. Do la titolo per si mem montras neniun miksiĝon de konceptoj – de l'*tutmonda* lingvo kaj de l'*internacia* lingvo (oni antentu – tekstoj de tiama tempo ofte miksas la konceptojn). En sia sufiĉe ampleksa artikolo S. Buliĉ traktas kialojn, kiuj instigas homaron krei artefaritajn lingvojn. De l'nuntempa vidpunkto nenion freŝan oni povas observi en la analizo (tamen ni ne forgesu, ke la artikolo aperis en 1892!). Tiuj kialoj laŭ prof. Buliĉ jenas: multnombreco de ekzistantaj etnolingvoj kaj ties malfacileco, certaj politikaj aspektoj kiuj ne permesas akcepti iun ajn lingvon etnan en kapablo de lingvo por transnacia komunikado. Estas interese, ke ĝis nun multaj de tiuj tezoj, nome, malfacileco de lingvoj etnaj argumentiĝas kiel malhelpiloj por ties alproprigo kaj konsekvenca uzado en internacia komunikado. Kial do malfacileco? Ĉu estas pli facile perfekte alproprigi Esperanton? Se jes, kial do la plejnombro de esperantistoj tamen restas „eternaj komencantoj"? Eĉ „denaskaj komencantoj" aperas (t.e., parencoj esperantistaj pene provas enkonduki Esperanton en vivon familian sed malsukcesas pro tio aŭ alio kaj la ido restas „semi-bakita". Aliflanke, de jaro al jaro ni observas pli kreskantajn nombrojn da homoj kiuj povas facile sin esprimi fremdlingve.

Prof.Buliĉ vaste parolas pri Latino, emfazante ties „ostiĝon" en leksiko, kio laŭ la aŭtoro ne permesas al Latino esprimi konceptojn modernajn. Tiun ĉi tezon ni povas renkonti abunde eĉ nuntempe en multaj verkoj, kiuj citas senpripense pensaron malnovan.

[2] Ĉefministro kaj Ministro de Internaj Aferoj de Ruslando (1862-1911)
[3] Schleyer J.M. „Volapŭk, die Weltsprache". Sigmarinen, 1880.
[4] Sergei Buliĉ estis reprezentanto de Kazana Lingvistika Skolo, unu de kies gvidantoj estis prof. J.Baudouin.de Courtenay.

Eĉ nuntempe troviĝas aŭtoroj kiuj evidente vivas trans montoj altegaj kie ne riceveblas radioelsendoj latinaj kaj kie ne aboneblas (tio bedaŭrinde rilatas al nuntempa Rusio) latinaj revuoj (vidu ĉi-respekte la libron de d-ro Vera Barandovská-Frank[5]). Se ni vastigos la limojn de ĉi tiu problemo, ĝi formuliĝos kiel potencproblemo de la t.n. „mortaj lingvoj". Ĉu vere ili (latino, altgreka, sanskrito, ktp) estas „mortaj"? Ĉu lingvoj romanidaj ne estas posteŭloj de Latino? Ĉu Angla ne entenas en sia vortprovizo preskaŭ 70% de latinaj vortoj (pruntitaj direkte aŭ pere de la Franca)? Ĉu moderna scienca terminologio preskaŭ ĉiutage ne uzas grekajn kaj latinajn vortelementojn? Ĉu mankas homoj parolantaj kaj skribantaj latine aŭ sanskrite? Tiun ĉi lastan nomas sia gepatra lingvo kelkaj miloj da hindoj kaj pluraj kelkcentmiloj nomas ĝin sia dua lingvo. Oni povus facile nombrigi tiujn „ĉu". La civilizo eŭropa ne povas disĵeti kaj neniam disĵetos heredaĵon grekan kaj latinan ĉar tiu estas „skeleto" de Eŭropo kaj plia mondo (Ameriko, ktp). Plue, publika intereso al, ekzemple, klasika Latino kreskas, kio montras ke problemo de „mortaj" lingvoj, vidata interlingvistike, restas nefermita... .

En artikolo de S. Buliĉ ĵetiĝas en la okulon la evidentaĵo, ke tutmonda lingvo estas definita dekomence kiel lingvo kreita intence! – „lingvo (plejparte artefarita, t.e., elpensita per unu homo, ne rezulto de natura evoluo) per kiu ĉiuj popoloj civilizitaj povus komuniki inter se skribe kaj buŝe" (Buliĉ, 1892). Sed ...tuj la penso mem pri lingvo internacia/tutmonda estas nomita utopio. Sendube tio devis ŝajni utopio por homo, eĉ edukita, vivanta en la lando dividita per invisiblaj naciaj limoj kaj barieroj kaj en la kontinento dividita per interesoj de kreskantoj naciaj monopolkapitaloj. La difino supre menciita estas tiumaniere projektita surestonten.

Skribante pri evoluo de internacia artefarita lingvo Buliĉ predikas lingvan disdialektiĝon en lokaj specoj kiuj siavice povos post ioma tempo estiĝi nekompreneblaj (ĉu ne estas ankaŭ konata penso ripetita foje kaj foje en eĉ nuntempaj verkoj?). Tiu tezo ŝajne devenanta de l'historilingvistika skolo estas rezulto de miksiĝo de du evoluprocedoj – natura kaj artefarita lingvoj. La lingvo artefarita, dekomence skriba kaj normigita, dubinde povos disfali en lokaj dialektoj (tamen, se homoj ĝin parolantaj estas kleraj – t.e. povas alemanŭ legi kaj skribi kaj faras tion ripete!). Certe, gepatraj lingvoj de parolantoj influas iujn lingvosistemojn, diru, fonetikon kaj, laŭ miaj observoj rilate Esperanton, frazeologion (idiomajn esprimojn). Tamen, preskaŭ ĉiuj deviaĵoj restas nesignifaj por kompreneblecο, kio estas demonstrata per ekzemplo de Esperanto kaj ... per multcentjara tradicio de studado kaj alproprigado de fremdlingvoj. Ĉio finfine dependas de lingvo-mastrumadnivelo, ne de geografio aŭ io simila. S. Buliĉ proponas „optikan" (simbolan) lingvon, t.e. pasigrafion por eviti fonetikjn malfacilajojn.

Prof. Buliĉ karakterizas artefaritajn lingvojn kiel surogatoj, povraj kaj neperfektaj. Tio sendube estis kaŭzita per ne tre longa kaj glora ekzemplo de Volapŭk. La vorto mem je la fino de l'jarcento iĝis (almenaŭ en Rusio) preskaŭ blasfema. Esperanto en tiu tempo ne kompareblis al la nuna stato kaj multaj lingvaj esprimfortoj ankoraŭ restis latentaj, nur potencoj. Sekve profesoro Buliĉ havis ja grundojn por tiel karakterizi artefaritajn lingvojn. Tamen, li neniam ilin kondamnas. Buliĉ konkludas sian artikolon ege profesie kaj profetaĵe – „... tiel aŭ aliel, konstanta aperado de projektoj por tutmondaj lingvoj, per

[5] Věra Barandovská-Frank (1995): „La Latina kiel Interlingvo". Praha, KAVA-PECH

si mem, ne nur indikas certajn sociajn bezonojn, sed ankaŭ servas, verŝajne, kiel indikilo de iuj nuntempe malklaraj por ni estontaj socievoluoj". Malgraŭ duboj kaj milda skepticismo profesoro Bulič sukcesis montri amplekson da problemoj ligitaj kun la nocio de tutmonda/internacia lingvo.

En la jaro 1912, proksimume 20 jaroj post apero de la supra artikolo, la volumo 11 de VefG ofertis al la leganta publiko artikolon de konata rusa historiisto kaj slavfilologo prof. A. L. Pogodin. La artikolo portis la titolon de „Tutmondaj Lingvoj" (Pogodin, 1912). Se prof. Bulič esplikis mildan skepticismon rilate artefaritajn lingvojn, lia plumkolego prof. Pogodin – akre negativan pozicion – „... krei vere tutmondan simpligitan lingvon estas ne eble kaj ne dezirinde". Legante la artikolon oni tuj venas al la konkludo, ke la aŭtoro meritita kaj konata konscie ne deziras koni realaĵojn de historio kaj akcepti funkcipraktikon de Volapük, Esperanto kaj Ido. Proklamitaj de sinjoro profesoro „neebleco kaj nedezirindeco" estas klarigitaj nur per aserto, ke artefaritaj lingvoj ne povus esprimi, laŭ aŭtoro, ĉiujn riĉaĵojn de l'mondo de l'homa pensaro. Sendube ĉi tie ni havas reeĥojn de la malnova disputo de logika kaj empiria tendencoj en filozofio kaj interlingvistiko. Tiun postulon pri „riĉaĵoj" oni povas facile renkonti longe post tiam, ekzemple en verkoj de konata rusa filzofiisto, ekonomisto kaj beletristo A. Bogdanov. Estante tranĉilakra rilate Esperanton, Pogodin ne ŝajnas doni al si penojn por studi realan staton de l'lingvo, li formale sin bazas, kiel pure „kabineta sciencisto", sur la 16-regula gramatiko, skribante pri manko de nunacoj en uzado de verbomodoj, tempoj, ktp.

La aŭtoro similigas evoluon de Esperanto al evoluo de naturaj, etnaj lingvoj, dirante ke samkiel el pralingvo evoluaperis apartaj lingvoj, Ido rezultiĝis el Esperanto. A. Pogodin fordonas la aferon de mondlingva formiĝo al iuj nebulaj spontaneaj procedoj de lingvoproksimiĝo en estonteco, premisoj de tiuj procedoj li malkovras en formiĝo de internacia leksika fonduso. Kaj foje, iu ajn moderna leganto povus tute prave diri, ke „nenio nova sub la luno". Tiun aĵon de internacia leksiko oni trovas en ĉiuj verkoj dediĉitaj al internaciaj lingvoj. Ĉu oni povas citi vere internaciajn leksemojn? La lingvo japana havas multajn pruntaĵojn leksikajn de la angla sed ĉu, ekzemple, angla komputeristo povus malkovri iujn ajn pruntaĵojn en japana teksto? Mi forte tion dubas. Ni havas en plejmulto da okazoj nurajn interregionismojn, eĉ – intraregionismojn. La malnova kanto de internacia leksiko bezonas grundan revizion je vidpunkto de moderna lingvistiko kaj ankaŭ de interlingvistiko.

Aldone, oni ĉiam tenu en memoro ke propagandinte internacian lingvon aŭ skribante pri internaciiĝprocedoj multaj aŭtoroj forgesas ke:

a) ekzistas principe du tendencoj en modernaj naciaj kaj lingvaj rilatoj: internaciiĝo kaj diversiĝo
b) centoj de milionoj da homoj en la mondo povas nek legi nek skribi, kio malhelpas internaciiĝon kaj formas baron neatingeblan por enkonduko de lingvo internacia.

Do, multaj lingvistoj kaj filozofiistoj ŝajnas senkonscie ellabori siajn prointernacilingvajn teoriojn por la civilizita, „norda" mondo. Kultur- kaj lingvoproblemoj de la mondo „suda" havas esence alian naturon.

Interesa estas karakterizo, kiun Pogodin donas al esperantistoj – „...naturoj revemaj, tre emaj al kredo kaj entuziazmiĝo" kaj ili estas „kunigitaj per idealismaj celoj de d-ro Zamenhof"... kunigi popolojn en unu fratan familion kaj krei neŭtralan grundon, sur kiu ĉiuj popoloj povus interkompreniĝi kaj amike inter si komuniki sen trudi unu al la alia siajn proprajn lingvojn aŭ siajn proprajn naciajn specifaĵojn". Sendube tio ŝajnis celo altagrade idealista en komenco de la jarcento, kiam la mondo haltis spiron antaŭ minaco de la mondmilito.

Malgraŭ la nombro de limoj kiuj estas parte pardoneblaj de vidpunkto de ĝenerala situacio en tiama Rusio kaj parte de psikologiaj kialoj, profesoroj S. Bulič kaj A. Pogodin sukcesis konatigi vastan kleran publikon de Rusio kun internacilingva problemaro. De alia flanko, artikolo de A. Pogodin povas esti konsiderita kiel unu paŝo malantaŭen en pritakso de artefaritaj lingvoj kaj ties potencoj.

Post revolucio de 1917 Rusio konfrontis multajn problemojn naciajn kaj lingvajn, ambaŭ interne kaj internacie. Novaj kondiĉoj ebligis ekfloron de internacilingva movado inklude Esperantan. En 20-30-aj jaroj multaj miloj da novaj adeptoj aliris Esperanton, kio komplete kaj radikale ŝanĝigis la socian tavoliĝon de l'movado. Esploroj de internacilingva problemaro ankaŭ ricevis fortegan impeton. Ne mankis tiam publikaj diskutoj de l'problemaro. Oni povis facile renkonti artikolojn kaj tekstojn de publikaj elpaŝoj rilate la problemaron. Multaj aŭtoroj de tiamo ne favoris lingvojn artefaritajn sur internacilingva areno. Ekzemple, la menciita A. Bogdanov donis favoron al la Angla kaj estis akre opozicia al iuj ajn artefaritaj.

Tamen, *retournons à nos moutons*, t.e. enciklopedioj. Tutnature, supozeblis, ke socia diversiĝo en vidpunktoj trovos esplikon en novaj enciklopedioj. Kaj vere en volumo 64 oni trovas artikoleton „Esperanto" de E. Drezen (Drezen, 1957), konata rusia Esperantogvidanto kaj interlingvisto, kiu donas ekzemplon de konciza kaj preciza informo. La aŭtoro difinas taskojn de internacia lingvo kaj skize sekvas la historion de E-movado.

De alia flanko, volumo 13 en rubriko „Lingvoj Tutmondaj" alsendas la leganton al la artikolo titolita „Internaciaj Lingvoj (Ĉemodanov, 1938), kiu estis skribita de prof N. Ĉemodanov. Tio (titolŝanĝo) montras iun ŝanĝon en terminologio kaj evidente en kapoj de sciencistoj. Tamen la enhavo de l' „Internaciaj Lingvoj" tuj evidentigas, ke la termino restis nediferenciita kaj ĝi entenis kvar lingvospecojn: regionajn lingvojn de antikvo kaj mezepoko, mondlingvojn de tiama tempo (angla, franca, ktp), internaciajn artefaritajn lingvojn kaj tutmondan lingvon de iu futuro. Tiu ĉi artikolo ankaŭ montras ke la profesoro eble ne tre atente studis eĉ bazajn dokumentojn. Li skribas, ke „... oni devas substreki ke eĉ Esperanto ... neniam povos anstataŭigi vivajn, popolajn lingvojn kaj ... povas ludi nur helpan rolon en internacikomunikaj rilatoj" (Ĉemodanov, 1938). Certe, por laiko senioro profesoro pravas, tamen ĉiu esperantisto dirus ke ankoraŭ en 1905 la unua E-kongreso en Boulogne-sur-Mer formulis la tezon pri la helpa rolo de Eo en la „Deklaracio pri Esperantismo". Similajn postulojn kaj tezojn oni facile malkovros en verkoj de 19-a jarcento (ekzemple, L. Le Hir, 1867).

Grandan parton de sia artikolo prof. Ĉemodanov dediĉas al tutmonda lingvo de estonteco, kio estis aĵo natura por la jaro 1938 (la artikolo datiĝas de tiu tempo. Legantoj verŝajne ne bezonas eksplikojn pri tiama tempo – oni multon tralegu en la libro de U. Lins[6]). Tiu parto de la artikolo estis influita per verkoj de alia „profesoro de ĉiuj profeso-

[6] Lins, Ulrich (1988): Die gefährliche Sprache. Gerlingen: Bleicher.

roj" J. Stalin, profesoro Ĉemodanov eĉ ne kovras tiun ĉi fakton, citante abunde la artikolon de Stalin „Marksismo kaj nacikolonia problemo". Do, la estonta monda lingvo estiĝos dum kunfandiĝo de kulturoj kaj lingvoj en solan kulturon kaj solan lingvon en malproksima futuro. Kompreneble, tiu estonteco estos la disfloro de komunista socio, laŭ N. Ĉemodanov. La menciita monografio de E. Svadost kaj pluraj aŭtoroj en okcidento multe skribis pri tiuj teorioj de lingv- kaj kulturamalgamiĝo, mi havas nenion novan. Tamen nurfoje mi substrekas, ke en procedoj de relativa leksika internaciiĝo oni ofte emas vidi procedojn de amalgamiĝo lingva. Oni ĉiam preteratentas ke vortoj estas nur ekstero, fasado de lingvo kaj post tiu fasado sin kaŝas ankaŭ arbustaro de fonetiko kaj arbaro de gramatiko. Tiuj ĉi lastaj flankoj de lingvoj preskaŭ ne montras signojn de kunfandiĝo. Oni tuj nomus, kontraŭe al mia tezo, t.n. lingvajn uniojn (ekz. balkanan), certajn komunajn kategoriojn en gramatiko. Tamen, nuntempe oni ne riskus lingvistike prediki kunfandiĝon de, diru, japana kaj angla aŭ bulgara kaj tagalog, ktp. Des pli, internaciigaj lingvoprocedoj estas pli aktivaj ĉe parencaj lingvoj, pli vaste ĉe lingvoj de l'sama lingva familio kaj ekzistas kelkaj de tiuj.

Resume, nuntempe ni ne havas sufiĉe kredindajn faktojn pri procedoj de lingvokunfandiĝo. Aldone, ŝajnas dubinde ke linvoj, kies leksikaj fondusoj vastiĝos (dank' al natura vojo de evoluo kaj al konsciaj paŝoj de lingvo-komunumoj), gramatikaj kaj funkciaj potencoj realiĝos, „emus" kunfandiĝi.

La artikolo priskribas alian vojon de kunfandiĝo, vojon pli kurban. Tiu ankaŭ estis influita per kelkaj artikoloj de J. Stalin:

a) uzado de gepatra + zona + interzona lingvoj je la unua etapo (tion ni iugrade observas nune en multaj mondregionoj),
b) uzado de zona kaj interzona lingvoj,
c) uzado de interzona lingvo kiu fakte estiĝas la monda je ĉi-tiu etapo.

Kompreneble, tio estas eblaĵo, sed eblaĵo de iu nedefinita estonteco kaj, en tiu kapablo, ne havanta ion similan al la realo. Plue, ĉu zonaj lingvoj estos bazitaj sur geografia aŭ sur lingva principoj? En Eŭropo, ugraj popoloj (finoj, estoj, hungaroj etc) loĝas inter romanidaj gentoj, kiuj estas ĉirkaŭitaj per germanoj. Lingva situacio multe pli komplikeblas en Afriko, Azio, ktp. Due, komuna multilingvismo sur la unua kaj dua etapoj ankaŭ prezentas pakon da problemoj, je la amasa kaj individua tavoloj. Oni ne forgesu, ke nuntempe ĉirkaŭ unu miliardo da homoj estas senalfabetaj...
La sama eldono de l'GSE I entenas ankaŭ artikolon „Artefaritaj Lingvoj" de konata rusia sociolingvistino R.O. Ŝor. Artefaritaj lingvoj, laŭ Ŝor, enfalas en tri tipoj de lingvaj formoj – filozofiaj projektoj de 16-18-a jarcentoj, lingvoj por internacia komunikado kreitaj en 19-20-a jarcentoj kaj specifaj lingvoformoj je la tipoj de slengo kaj ĵargono. Se, kun siaspeca spico, oni nomus la unuajn du tipojn lingvoj, la tria evidente ne apartenas al tiu kategorio. Ĝi plejparte estas reprezentita per specifaj leksikaj tavoloj ene de tiu aŭ alia etna lingvo. Kaj plu, ĵargonoj kaj samspecaj formoj faras aĵon tute kontraŭan kompare kun la lingvo – ili limigas la mondon de parolantoj (komprenantoj), ne ĝin vastigas, kio estas la tasko, funkcio de l'lingvo, plue lingvo internacia. La plua enhavo de l'artikolo

evidentigas, ke R. Ŝor emas konsideri iun ajn signosistemon la lingvo, fandinte tielmaniere la homan lingvon en oceano de signoj.

Tamen, la evidenta merito de l'profesorino Ŝor estis tio, ke ŝi alvokis lingvistojn al pli vasta esploro de problemaro pri internaciaj artefaritaj lingvoj. Ŝi ankaŭ forte kritikis la koncepton mem de artefariteco rilate la lingvon. Oni devas ĉi-loke rimarki, ke tiuspeca kritiko ne prezentis iun novan vorton en lingvistiko rusia, oni memoru, ke profesoro J. Baudouin de Courtenay siatempe vaste skribadis pri problemaro. Kaj aldone, tiama lingvokonstrupolitiko vaste implementata en Sovjetrusio montris absurdecon de ĉiuj paroloj pri „inkuboj" kaj ceter'. En tiu tempo lingvistoj kreadis dekojn da alfabetoj por popoloj kiuj neniam havis skribajn linvojn, vasta terminnormiga programo estis ankaŭ implementata.

GSE I estis la lasta antaŭmilita enciklopedio (Interese, ke samtempe oni publikigis ankaŭ la 14-an stereotipan eldonon de VefG). La dua mondmilito (kaj konataj persekutprocedoj en Rusio kaj Germanio) portempe ĉesigis aŭ haltigis interlingvistikajn esplorojn en Eŭropo. Vasta publika intereso al problemaro ĉesis por preskaŭ dudek jaroj. Postmilitaj jaroj en Rusio ankaŭ ne montris intereson al interlingvistiko, opinioj de J. Stalin dominis surkampe por longa tempo.

La dua GSE nur evoluigis la plej reakciajn tendencojn de GSE I en la kampo lingvistika. Ekzemple, la naŭa volume de GSE II diris ke „.. ĉiuj provoj enkonduki artefaritajn lingvojn kaj eĉ ties projektojn estas malvirtaj en principo. Artefarita lingvo por la homaro estas neplenumebla utopio" (Vsemirnij jazik, 1951). Oni rimarku ke en tiamo oni nomis genetikon kaj kibernetikon utopio kaj burĝa elpensaĵo (Kratkij filosofskij slovar', 1954). Tiu postmilita enciklopedio respegulis, milde dirite, konfliktojn de sovetia periodo postmilita kaj la supra citaĵo el l'artikolo „Tutmonda lingvo" tion evidentigas. Vastan lokon la redaktoroj (! ĉar artikoloj estas anonimaj) donis al propagando de J. Stalin-*a* opiniaro, precipe de la teorio pri zonaj lingvoj, la resto estas miksaĵo de menciitaj artikoloj el GSE I kaj de prof. Pogodin kaj parte de Bulič. Karakteriza estas ankaŭ la titolo mem – *tutmonda* lingvo, ne internacia, kio montras la tiaman specon de „globa" pensado. Jen ankoraŭ unu citaĵo de tiu ĉi artikolo – „... malsukcesaj provoj enkonduki artefaritajn lingvojn kondukis al falsa konvinko, ke la tutmonda lingvo plejeble estos unu de la plej disvastigitaj naturaj lingvoj de nuntempo. Anglo-amerikaj faŝistemaj teoriuloj alskribas ĉi rolon futuran al la angla lingvo. La teorio tutplene respondas al uzurpeco de amerikaj gvidantoj kiuj deziras mondregni ..." (Oni povus observi similaĵojn eĉ nune!). Nenio nova troviĝas en alia artikolo de GSE II „Artefaritaj lingvoj", kiu ŝajnas esti nur variaĵo de la unua artikolo.

Iom da tempo pasis kaj nova volumo de l' sama GSE II aperinta en 1957 alportis artikolon „Esperanto" kies tono mirakle ŝanĝis – de senmotiva neado de iuj ajn artefaritaĵoj lingvaj en antaŭaj artikoloj ĝis rezervita kaj informa tono de „Esperanto". La aŭtoro substrekas la helpan rolon de Esperanto kaj, je la unua fojo en enciklopedioj, ĵetas rigardon al lingvodidaktika rolo de Esperanto, dirante ke alproprigado de etnaj fremdlingvoj pasas pli glate post studo de Esperanto. Tiu nova tono ebliĝis dank' al novaj ventoj ekblovintaj en la lando post morto de Stalin en 1953. Jam en 1956 merititaj lingvistoj profesoroj O. Aĥmanova kaj E. Bokarjev alvokis lingvistaron plivastigi esplorojn de in-

terlingvistika problemaro (Aĥmanova, Bokarjev, 1956). Iom post iom tiu alvoko trovis siajn reeĥojn kaj oni lanĉis poiomajn studojn.

Je la tempo, kiam nova eldono de GSE III aperis, baldaŭ rusiaj kaj eksterlandaj lingvistoj akumulis novajn spertojn kaj ellaboris freŝajn alirojn al multaj interlingvistikaj problemoj. Tion reflektis nome la artikolo „Helpaj lingvoj" kies plejparto estas dediĉita al internaciaj helpaj lingvoj. Tamen, evidente pro troa entuziasmo de novaj tempoj, la aŭtoro sin ĵetas al alia ekstremo – internacia helpa lingvo vidiĝas al li nur artefarita. La menciita artikolo ankaŭ proponas difinon de interlingvistiko – „... branĉo de lingvoscienco, kiu esploras principojn por krei helpajn lingvojn". Evidentiĝas, ke la volumeno de la scienco estas limigita nur al lingvokonstrua flanko. La problemo de kompetenteco interlingvistika estas plue precizigita en alia artikolo de GSE III, „Interlingvistiko" kie la aŭtoro sennoma aldonas al interlingvistika scienco alian parton – teorio de funkciado de internaciaj lingvoj, kio modernigas la nocion. Oni ne povas tamen ne senti, legante ĉi artikolon, ke la aŭtoro estas matematikisto, ne lingvisto. Lingvistiko sub lia plumo turniĝas en iun kvazaŭmatematikan teorion de lingvo. Eĉ en 1966 la Vortaro de Lingvistika Terminaro sub gvido de O. Aĥmanova konstatis kaj firmigis ĉi-specan komprenon de interlingvistiko (Kuznecov, 1987). Verŝajne, formiĝo de la t.n. matematika lingvistiko en tiama tempo kaj ĝenerala optimisto pri komputilpotencoj influis multajn aŭtorojn.

En GSE III oni nepre legu la artikolon „Artefarita lingvo", skribitan de Eŭgeno Bokarjev, kiu distingis du tipojn de artefaritaj lingvoj – informaj (maŝinaj) lingvoj kaj internaciaj helpaj artefaritaj lingvoj. La plejparto de la artikolo estas dediĉita al la lasta kategorio, kio sole estis nature por la aŭtoro, konata interlingvisto. Faktoriĉan artikolon „Esperanto" (volumo 30, p. 251) skribis por GSE III V.P. Grigorjev.

Resumante, komence de la 90aj jaroj de l'pasinta jarcento ĝis la proksimume 70-aj jaroj de la unua rusiaj kaj sovetiaj enciklopedioj tiel aŭ aliel sukcesis propratempe reflekti problemojn de la tutmonda, internacia kaj artefarita lingvo, konatigante vastan publikon de la lando kun koncerna problemaro. Templimoj de la menciitaj enciklopedioj povus teorie servi kiel limoj de diversaj etapoj en la interlingvistika pensaro mem, tamen ne servis. Ŝuldaj pro tio estis konataj politikaj evoluoj enlande kaj tutmonde (Tradicie, rusiaj aŭtoroj skribantaj pri sociaj problemoj, kies grandan parton konsistigas ankaŭ lingvoproblemoj, ĉiam devis observi, de kiu flanko ventoj blovis). Aro de politikaj kaj ideologiaj faktoroj bremsis evoluon de la landa interlingvistiko, kio oblikve montriĝis en la analizitaj vortaroj. Certaj ecoj de la artikolaŭtoroj ankaŭ gravis – oni ne povas ne konsideri vivecon de la komparhistoria lingvistiko en konscio de lingvistoj kaj aliaj aŭtoroj, kion R. Ŝor menciis en sia artikolo. Tamen, malgraŭ aro de negativaĵoj, malgraŭ saltado de l'ekstremo al ekstremo, la menciitaj enciklopedioj difinis multajn problemojn kiuj eĉ nune ne perdis sian gravecon, kontraŭe, ilia graveco eĉ plu kreskis. Oni nomu nur kelkajn – metodoj kaj rimedoj de internacia komunikado, artefariteco kaj natureco en lingvoj, sociaj kaj politikaj aspektoj je adopto de helpa lingvo, evoluproblemoj de artefaritaj lingvoj, ktp.

Multaj akvoj forfluis de la 70-aj jaroj ĝis nun kaj multo ŝanĝiĝis en la lando kaj la mondo ekstera. Novaj eldonoj de Grandaj Enciklopedioj publikigotaj nepre devos konsideri esplorrezultojn de la nova tempo (M. Isajev, V. Grigorjev, S. Kuznecov, A. Duliĉenko[7], k.a.). Lastaj jaroj vidis multajn evoluojn en la kampo de interlingva komunikado – ŝanĝo de lingvistika mapo, akriĝo de la lingva problemo en la Eŭropa komunumo kaj ie ajn, vasta uzado de komputiloj en instruo, inklude de lingvoinstruo, ktp, ktp. Vasta intrudo de komputoroj en lingvistikaj esploroj, estiĝo kaj atingoj de komputila lingvistiko kombinitaj kun la ve! nesolvitaj problemoj de pasinteco formas novan aron da problemoj ankoraŭ nereflektitan en iu ajn aŭtoritata enciklopedio, „spegulo de l'epoko"... .

Literaturo

Aĥmanova, O.S., Bokarjev, E.A: *Meždunarodnij vspomogatelnij jazik kak lingvistiĉeskaja problema* (La internacia helpa lingvo kiel problemo lingvistika), Voprosi jazikoznanija. – No. 6. – p. 65-78, 1956

Aĥmanova, O.S.: *Slovar' lingvistiĉeskiĥ terminov* (Vortaro de lingvistikaj terminoj). Moskva, 1966

Blanke, D.: *Internationale Plansprachen. Eine Einführung.* Berlin, 1985

Bokarjev, E.A.: *Iskusstvennij jazik* (Artefarita lingvo), GSE III, Vol. 10. p. 474, Moskva, 1972

Buliĉ, S.: *Vsemirnij ili mezdunarodnij jazik* (Tutmonda aŭ internacia lingvo), VEBE, St. Peterburg, Vol. VII., p. 393-397, 1892

Ĉemodanov, N.C.: *Meĵdunarodnije jaziki* (Internaciaj lingvoj), GES I, Vol. 38, p. 651-652, Moskva, 1938

Drezen, E.: *Esperanto*, GSE I.Vol. 64, p. 637-638, Moskva, 1933

Esperanto: *GSE II*, Vol. 49, p. 185, Moskva, 1957

Iskusstvennije jaziki *(Artefaritaj Lingvoj), GSE II*, Vol. 18, p. 504-505, Moskva, 1953

Kratkij filosofskij slovar' *(Konciza filozofia vortaro)*, Moskva, 1954

Kuznecov, S.N.: *Teoretiĉeskije osnovi interlingvistiki* (Teoria fundamento de interlingvistiko), Moskva, 1987

Pogodin, A.L.: *Vsemirnije jaziki* (Tutmondaj lingvoj) VefG. Moskva, Vol. II, p. 502-508, 1912

Raskin, V.V.: *Vspomogatelnij jazik* (Helpa lingvo), GSE III, Vol. 5, p. 477-478, Moskva 1971

Ŝor, R.S.: *Iskusstvennije jaziki* (Artefaritaj lingvoj), GSE I, Vol. 29, p. 334-335, Moskva, 1935

Svadost, E.: *Kak vozniknet vseobstĉij jazik?* (Kiel estiĝos lingvo Universala?), Moskva, 1967

Vsemirnij jazik *(Tutmonda Lingvo), GSE II*, Vol. 9, p. 306-307, Moskva, 1953

Ricevita 1998-03-30

Adreso de la aŭtoro: Leonid N. Myasnikov, 2/1 Rabotschaya Str., W. 4, RUS-182100 Velikie Luky

Through Russian Encyclopedias (summary)

The article traces the history of same basic interlinguistic notions as seen through the eyes of Russian encyclopedias, covering the period of 1890 – 1970. The sources are represented by two tsarist Russia multivolume encyclopedic dictionaries and by three consecutive editions of the Great Soviet Encyclopedia. Despite the proclaimed neutrality of scientific and scholarly knowledge, the considered sources reflect the ideological and cultural paradigms reigning in the society at this or that time. Still, even under ideological pressure the encyclopedias of Russia managed to bring to the reader a larger scope of knowledge and opinions as one would expect after considering the issue date.

[7] **Magomet Isajev**, sociolingvisto, interlingvisto, estis ĉefo de Interlingvistika Grupo ĉe l'Instituto de Lingvoscienco. Specialisto pri iraniaj lingvoj. **Sergej Kuznecov**, interlingvisto, aŭtoro de kelkaj valoraj interlingvistikaĵoj. Specialisto pri dana lingvo. **Viktor Grigorjev**, interlingvisto. Specialisto pri poetiko. Iama membro de Esperanta Akademio. **Alexander Duliĉenko**, profesoro de Tartua Universitato, Estonio, meritita interlingvisto, specialisto pri slavaj lingvoj.

grkg / Humankybernetik
Band 39 · Heft 3 (1998)
Akademia Libroservo / IfK

Differenzierung von Lernprozessen unter dem Gesichtspunkt der Selbständigkeit

von Harald RIEDEL, Berlin (D)

aus dem Institut für Grundschulpädagogik der Technischen Universität Berlin

1. *Vorbemerkungen*

In meinem letzten Beitrag[1] hatte ich ausgeführt, daß Lernprozesse im Sinne der Systemischen Didaktik nach mindestens 7 Aspekten eingeordnet werden sollten, von denen die Selbständigkeit und der Grad der Bewußtheit des Lernenden als die beiden wichtigsten herausgestellt wurden. Wie bei jedem mehr-dimensionalen Modell birgt es Gefahren der Vereinfachung in sich, wenn man versucht, lediglich ***eine*** Dimension eines Gesamtmodells darzustellen. Wenn ich mich in diesem Beitrag dennoch allein mit der Differenzierung von Lernprozessen unter dem Gesichtspunkt der Selbständigkeit beschäftige, muß ich betonen, daß die dargestellte Differenzierung nicht unabhängig von den anderen Dimensionen zur Bewertung von Lernprozessen betrachtet werden darf.

2. *Zum Maßstab der Selbständigkeit*

Eine der verbreitetsten didaktischen Forderungen ist jene nach Selbständigkeit beim Lernen.[2] Der Begriff der „Selbständigkeit" ist allerdings äußerst schillernd und mehrdeutig. Wann lernt jemand selbständig oder unselbständig? In der didaktischen Diskussion wird diese Frage wie andere auch oft recht einseitig beantwortet. Die meist pauschale Antwort lautet: Ein Schüler lernt selbständig, wenn er dies ohne Anleitung oder Hilfe seitens eines Lehrenden tut. Oder: Je geringer der Einfluß eines Lehrenden, desto höher ist die Selbständigkeit des Lernenden. Stichworte wie „Freie Arbeit" oder „Offener Unterricht" belegen dies. Zur Beantwortung dieser Frage wurde in der Systemischen Didaktik ein differenzierendes Modell entwickelt, lange, bevor die genannten Unterrichtsformen diskutiert wurden. Dabei handelt es sich um ein Teilmodell, das einerseits differenzierende Betrachtungen hinsichtlich des Freiraumes von Lernenden in bestimmten Lernsituationen ermöglicht, aber auch Bezugspunkte aufweist, von denen her der Grad an Selbständigkeit beim Lernen beurteilt werden kann.

[1] H. Riedel, 1996 b, S. 59 - 70
[2] Vgl. z.B. P. Oswald 1964 und H. Kretschmer / J. Stary 1998, S. 71.

Dieses Modell zur Differenzierung von Lernsituationen[3] unterscheidet Lernsituationen unterschiedlicher Komplexität mit jeweils unterschiedlichem Grad an ***Freiraum*** seitens des Lernenden bzw. ***Steuerung*** seitens des Lehrenden:

1. die einfache Lernsituation,
2. die gesteuerte Lernsituation,
3. die geregelte Lernsituation,
4. die Unterrichtssituation,
5. die selbst-gesteuerte Lernsituation oder Studien-Situation.

Die Freiheit des Lernenden nimmt von der ersten Lernsituation zur vierten hin stetig ab. In der fünften, der selbst-gesteuerten Lernsituation ist sie jedoch optimal (vgl. dazu H. RIEDEL 1979, 1993 a, 1993 b und 1994 a).

Allerdings wird landläufig fälschlicherweise angenommen, daß ein größerer Freiraum des Handelns und Denkens auch immer eine höhere Selbständigkeit des Lernens zur Folge hat. Leider aber trifft das nicht zu. Das Lernen auch in der selbst-gesteuerten Lernsituation kann je nach Befindlichkeit und Anspruch des Lernenden manchmal sehr einfach, imitativ, nachvollziehend, in anderen Fällen aber auch sehr anspruchsvoll, problembewußt und schöpferisch verlaufen. Um die Qualität von Lernprozessen zu differenzieren und dementsprechend auch gezielt fördern zu können, wird daher ein weiteres Modell benötigt, das „quer" zum Modell der Lernsituationen verwendbar ist und „Selbständigkeit" nach anderen Gesichtspunkten als nur dem Grad der Steuerung bzw. des Freiraumes beurteilt. Voraussetzung für die Entwicklung eines solchen Modells sind feste Bezugspunkte, von denen her der Grad an Selbständigkeit beim Lernen beurteilt werden kann. Sie gehen aus dem schon genannten Modell zur Differenzierung von Lernsituationen hervor: Es sind das ***Operations-Objekt***, das ***Operations-Ziel***, ***das Unterrichts-Ziel*** und das ein Unterrichts-Ziel repräsentierende ***Problem***. Aus ihnen lassen sich die vier Stufen der Selbständigkeit[4] im Lernvorgang ableiten, die ich im folgenden einzeln beschreiben werde: das ***nachvollziehende***, das ***aufgaben-gesteuerte***, das ***problem-gesteuerte*** und das ***problem-entdeckende*** Lernen.

3. *Das nachvollziehende Lernen*

Eine der Prämissen der Systemischen Didaktik besagt, daß Lernen nur durch (selbständige) Operationen an einem Operations-Objekt möglich ist. Anstatt mit dem Begriffs-Paar „selbständig - unselbständig" zu arbeiten, müssen wir im Hinblick auf das Operations-Objekt nach der Qualität der am Operations-Objekt vollzogenen Intern-Operationen fragen.[5] Braucht der Lernende Informationen lediglich zu erkennen oder zu erinnern (das

[3] H. Riedel, H 1973, S. 19 - 46 und 1993 a, S. 51 - 65.
[4] W. Einsiedler (1978, S. 201f) nahm bereits eine ähnliche Einteilung von Lernprozessen vor. Allerdings verabsolutierte Einsiedler die Dimension der Selbständigkeit: Das ist bei dem typisch eindimensionalen Vorgehen, wie es in der Unterrichtswissenschaft üblich ist, nicht verwunderlich. Andererseits vermengte er die Dimension in fehlerhafter Weise mit anderen Dimensionen, wie Offenheit der jeweiligen Lernsituation sowie Gegenständen und Zielen des Lernens.
[5] Ein Modell zur Differenzierung von Intern-Operationen beschreibt H. Riedel 1991 a, S. 15-28 und in weiteren Arbeiten. Darin werden u. a. die kogneszierenden Operationen ERKENNEN und ERINNERN von den

sind nur ***kogneszierende*** Operationen), oder besteht die Möglichkeit bzw. Notwendigkeit, ***produzierend*** zu operieren? Denn auch wenn der Lehrende ein bestimmtes Operations-Objekt vorgegeben hat, ist es möglich, daß die Operationen des Lernenden, sofern sie nicht eingeengt werden, zu einem anderen Operations-Ergebnis führen, als es dem Lehrenden vorschwebt.

Eine Katze oder ein Maikäfer in der Unterrichtsstunde provozieren dies geradezu wegen der großen Bandbreite an pragmatischer Information. Aber auch ein Dominospiel, bei dem einander entsprechende Klein- und Großbuchstaben aneinandergefügt werden sollten, veranlaßt manche Lernenden eher dazu, daraus Türme und Brücken zu bauen. Oder eine Streichholz-Aufgabe im Mathematikunterricht verführt die Schüler zu Zündel-Versuchen. Oder Studierende analysieren nicht, wie vom Hochschullehrer erhofft, eine vorgelegte Unterrichtsplanung entsprechend den Kriterien, die bislang erarbeitet wurden, sondern assoziieren lediglich Erfahrungen, die sie selbst als Schüler mit dem betreffenden Unterrichts-Objekt gemacht haben.

Je nachdem, wie stark der Lehrende die Operationen des Lernenden am Operations-Objekt beeinflußt, wird die Möglichkeit für den Lernenden erweitert oder verringert, ein Operations-Ziel selbständig, d.h. durch produzierende Operationen am Operations-Objekt zu erreichen. Beim ***nachvollziehenden Lernen*** läßt der Lehrende den Lernenden einen nur beschränkten Spielraum, ohne daß dies ihm selbst oder dem Lernenden bewußt sein muß. Das gilt insbesondere, wenn der Lehrende selbst auch noch die Rolle des Operations-Objekts übernimmt.

Dies ist beispielsweise der Fall, wenn er eine Bewegungsform beim Tanz oder beim Fußballspiel vorführt und sie nachvollziehen läßt. Das Nach-Singen einer Melodie, das Nach-Sprechen eines Textes, das Nach-Ahmen von Umgangs- oder Begrüßungsformen, von sprachlichen Eigenarten oder von modischer Bekleidung sind andere Beispiele für nachvollziehendes Lernen.

Im täglichen Leben zeigt sich, daß nachvollziehendes Lernen trotz der nur anspruchsloseren kogneszierenden Operationen außerordentlich wirksam sein kann. Voraussetzung dafür ist allerdings, daß zwischen Lernenden und Lehrendem ein fester emotionaler Bezug existiert, so daß die sog. „Vorbildfunktion" zur Wirkung kommt. Vorbilder können Autoritäten wie Lehrer, Eltern, Showmaster, Sportler usw. sein, aber auch Gleichrangige wie Freunde, Klassen- oder Mannschaftskameraden. Insofern ist es gerechtfertigt, diese Art des Lernens auch als Lernen nach ***Vorbildern*** oder als ***Modell-Lernen*** zu bezeichnen.[6] Nachvollziehendes Lernen geschieht aber auch unabhängig von Personen an Objekten.

Der Einfluß des Fernsehens auf Schüler wie auf Erwachsene wird zwar unterschiedlich beurteilt, negativ in Hinsicht auf vorgeführte, unerwünschte Verhaltensmuster, positiv im Hinblick auf den belehrenden Charakter, auf jeden Fall aber wird dabei nachvollziehend gelernt, ohne daß ein direkter Bezug zu Personen besteht. Das wird noch deutlicher in Fällen, in denen Schüler aufgrund bestimmter Literatur und Lesegewohnheiten ihren Sprachstil ändern. „Nebenher" lernen sie Sprachmuster oder auch Rechtschreibfähigkeiten.[7]

Für die Bedingungen, die beim nachvollziehenden Lernen herrschen, gibt H. AEBLI (1985, S. 367f) ein anschauliches Bild:

Er vergleicht den Schüler mit einem Bergsteiger, der als Anfänger einen Berg unter der straffen Leitung eines Führers ersteigt. „Physikalisch gesehen hat er (der Anfänger) den Berg zwar selbst erstiegen, d.h. er hat jeden

produzierenden Operationen AUSWERTEN, KONVERGENT DENKEN, DIVERGENT DENKEN und ORIGINAL DENKEN unterschieden.

6 Der Zusammenhang verschiedener Motive und einzelner Lernprozesse soll in einer weiteren Arbeit geklärt werden.

7 Die Bemerkung „nebenher" ist ein Hinweis darauf, daß nachvollziehendes Lernen nicht nur nach dem Gesichtspunkt der Selbständigkeit, sondern auch nach dem Grad der Bewußtheit der Lernenden unterschieden werden muß.

Schritt und jeden Klettergriff selbst ausgeführt. ... Der Führer aber hat ihm den Weg gewiesen, ist ihm vorangestiegen und hat ihm an jeder schwierigen Stelle genau gesagt, was er tun soll."[8]

Die physikalische Leistung entspricht der Operation des Lernenden am Operations-Objekt. Natürlich wäre auch eine noch unselbständigere Situation denkbar, in welcher der Bergführer seinen Schützling wie einen Verunglückten den ganzen Berg am Seil emporzieht. Doch genauso unrealistisch wie diese Vorstellung wäre die Übertragung auf eine Lernsituation. Wichtig für unseren Vergleich ist allerdings, daß der Bergführer bzw. der Lehrer nicht nur sagt, ***was*** getan werden soll, sondern auch ***wie*** es ausgeführt werden soll, sonst würden kogneszierende Operationen nicht genügen.

Wie vorangegangene Beispiele zeigen, spielt nachvollziehendes Lernen auch im Schulunterricht eine wichtige Rolle, insbesondere beim Lernen sozialer Einstellungen und Verhaltensweisen.[9] Für das Erlernen anderer Unterrichts-Objekte, insbesondere für Informationen, ist es jedoch wegen seiner Anspruchslosigkeit und der damit verbundenen negativen Langzeitfolgen im Hinblick auf eine zunehmende Unselbständigkeit unangebracht, wie das folgende Beispiel zeigt (vgl. H. RIEDEL 1994a, S. 18):

Schüler eines 4. Schuljahres sollen lernen, welche Stoffe den elektrischen Strom leiten und welche nicht. Der Lehrende baut einen offenen Stromkreis mit Glühlampe als Anzeiger für den Strom auf und demonstriert anhand von mehreren Gegenständen unterschiedlichen Materials, welche davon leitfähig sind, welche nicht. Die Lernenden haben die Möglichkeit, in kleineren Gruppen mit entsprechenden Materialien dieselben Versuche durchzuführen. Anschließend wird eine Tabelle mit leitenden und nicht-leitenden Materialien an der Tafel erstellt und von den Schülern abgeschrieben.

Gegenstand	Lämpchen	
	leuchtet	leuchtet nicht
Pfennig		
Schnur		
Stein		

Obwohl die Schüler hier äußerlich aktiv sind, werden sie doch wie ein „blinder Esel" vom Lehrenden direkt zum Operations-Ziel geführt. Die Lernenden vollziehen lediglich ***kogneszierende*** bzw. ***re-produzierende*** Operationen. Ist nachvollziehendes Lernen für den Erwerb von Einstellungen und Verhaltensweisen durchaus angemessen, so stellt es in fast allen Fällen des Informations- (oft auch des Technik-) Erwerbs eine unerwünschte Unterforderung für die Lernenden dar.

Das ***nachvollziehende*** Lernen ist entsprechend den vorangegangenen Beispielen durch folgende Merkmale gekennzeichnet:

- Der Lernende operiert zwar ***selbständig***,
- aber nur ***kogneszierend*** am Operations-Objekt (in Bild 1 durch die dunkle, von unten bis zur Marke „Operations-Objekt" reichende Fläche dargestellt)
- wird ***vom Lehrenden*** direkt auf die einzelnen Operations-Ziele ***hingeführt*** (in Bild 1 durch die helle Fläche markiert).

8 Aebli unterscheidet allerdings das nachvollziehende und das aufgaben-gesteuerte Lernen nicht. Beide Formen werden bei ihm unter dem Begriff der „Mäeutik" zusammengefaßt.

9 In der Systemischen Didaktik werden vier Grundformen von Unterrichts-Objekten unterschieden: Informationen, Techniken, Einstellungen und Verhaltensweisen (vgl. H. Riedel 1997 oder König/Riedel 1975, S. 21 - 35).

Problem
Lern-Weg
Operations-Ziel
Operations-Objekt
LEHRENDER gibt vor
SELBSTÄNDIG
erarbeitet
LERNENDER
NACHVOLLZIEHEND
AUFGABEN-GESTEUERT
PROBLEM-GESTEUERT
PROBLEM-ENTDECKEND
Stufe der SELBSTÄNDIGKEIT

Bild 1: Differenzierung von Lernprozessen unter dem Aspekt der Selbständigkeit

4. *Das aufgaben-gesteuerte Lernen*

Um die besonderen Merkmale des aufgaben-gesteuerten Lernens von jenen des nachvollziehenden Lernens abzuheben, wandle ich das Bild vom Bergsteiger folgendermaßen ab:

